

Esperanto *en Danio*

12-a jarkolekto • n-ro 2 • majo 2005



Foto de la jarkunveno 2005

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4

2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16

✉ dea@esperanto.dk

Girokonto: 805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Ina Schultz (kasisto)

Jytte Sunekær (sekretario)

Ejnar Hjorth (vicprezidanto)

Bent Jensenius

Rasmus Høyrup Jensen

Jens S. Larsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård

Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 24 47 50 40

✉ eed@esperanto.dk

Presado:

Atlas-Quick

Adresŝanĝoj al:

Ina Schultz

Bredagervej 21, 3.th.

2770 Kastrup

☎ 32 52 19 58.

✉ ina.schultz@get2net.dk

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:
10.08.2005

Enhavo

Lande

Raporto pri la jarkunveno.....	3
Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de DEA.....	4
Apelacio al ĉiuj, kiuj legas gazetojn! .	6
Esperantistoj honoras H.C. Andersen.....	6

Loke

Kopenhago.....	7
Næstved	9
Århus.....	9

Monde

Pri UK en Vilno 2005	10
Pri IJK en Zakopane.....	11
Invito el Latvio.....	11
SOMERE en Wissen	12
KEF post kvin jaroj refoje en Finnlando.....	13
22-a Internacia Festivalo.....	14
Belas Skotlando dum juni'.....	14
DEJO-ano en Brazilio	15
Internacia amikeca rentontiĝo en Bulonjo.....	16
Intimaj sentoj en Prago.....	17
Reklamo pri Esperanto aperos tra Google.....	18
“Juna Amiko” aperas kun pli dika aspekto	19
Ĉu viaj infanoj kaj familio parolas Esperanton?	19
Retejo en 24 lingvoj popularigas Esperanton	20
Forpasis Ludovikito	21
Esperanto-malpermeso antaŭ 70 jaroj.....	22

Lande

Raporto pri la jarkunveno

Ĉi-foje ni kunvenis en bela kaj komforta loko, la Agrikultura Lernejo en Tune, kiu ŝajne tre plaĉis al la partoprenatoj. La tutan posttagmezon ni havis brilajn prelegantojn komencante per *Tove Skutnabb-Kangas*, kiu tre fervore kaj varme prelegis pri lingvaj homaj rajtoj kaj lingvoj mortigaj. Laŭ la statistiko ekzistas ĉirkaŭ 6-7000 lingvoj en la mondo, sed oni malmulte faras por konservi ilin. Ŝia opinio estas ke oni devas konservi kaj evoluigi ilin anstataŭ detruigi ilin. Ŝi komparis la difinon de genocido kun la lingva situacio, kaj konstatis ke oni hodiaŭ povas paroli pri lingva genocido, precipe koncerne la edukadon de indigenaj grupoj, kiujn oni devigas eklerni la lingvon de la plimulto. Kiam ilia lingvo malaperas kaŭze de tiu agado, oni fakte povas difini la anstataŭantan lingvon kiel mortigan lingvon.

Hodiaŭ la angla lingvo funkcias kiel mortiga lingvo en Danio kaj aliaj landoj. Laŭ la opinio de Skutnabb-Kangas, Esperanto ne povas funkcii tiamaniere, kaj ŝi sugestis ke la Esperanta movado emfazu tiun aspekton de la lingvo. En la Deklaracio de homaj rajtoj (1948), artikolo pri edukado, oni tute nenion mencias pri lingvoj, kaj en la Eŭropa konvencio pri minoritatoj, parto III, oni limigas sin per esprimoj kiel “se eblas” “kie gravas”, “kiom necesas” k.t.p. Ŝi demandis, ĉu Esperanto ne devus esti menciita kiel minoritata lingvo? Ĉu infano kiu havas Esperanton kiel unu el siaj gepatraj lingvoj ne devus havi la rajtojn de minoritata lingvo? Bedaŭrinde ne estis tempo por diskuti tiujn tre interesajn aspektojn, ĉar ni devis turni nin al la sekva preleganto.

Michael Cwik parolis pri la rolo de Esperanto en Eŭropa Unio: Pri komunikado en multlingva komunumo. Li rakontis pri la konkludoj de la simpozio kiu okazis en majo 2003 en la Eŭropa Parlamento, kie oni diskutis la devojn en la lingva uzado por la civitanoj de EU kaj la 8 principojn pri komunikado inter popoloj en multlingva komunumo. Li tuŝis la eblan estontan rolon kiun povus ludi komunikadlingvo planita kaj neŭtrala kiel Esperanto, por konservi la kulturan identecon de ĉiu lingva komunumo, kaj garantii samtempe nediskriminacian kaj efikan komunikadon inter civitanoj parolantaj malsamajn gepatrajn lingvojn. Esperanto povas garantii “diversecon en unueco”.

Eckard Bick parolis pri la projekto VISL ĉe Suddana Universitato en Odense. Temas pri aŭtomataj analizoj por naturaj lingvoj (ankaŭ Esperanto) kaj publikaj retprogramoj/retpaĝoj por instrui gramatikon, traserĉi tekstobankon kaj traduki tekstojn. Bedaŭrinde li ne povis montri ekzempljn, ĉar oni ne havis eblecon eniri la Interreton por montri vivajn ekzemplojn, sed li tamen donis al la aŭskultantoj impreson de la maniero kiel funkcias tiuj sistemoj.

Estis vere tre instrua kaj interesa posttagmezo! Post la vespermanĝo ni kunvenis denove, tiufoje por distri nin dancante usonajn popoldancojn instruataj de kompetenta kaj vigla dancinstruistino Solvej Malmhøj.

Ileana Schröder

Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de DEA

Okazinta dimanĉe la 10-an de aprilo, je la horo 09.00
en la Agrikultura Lernejo de Tune (Tune Landboskole en Greve).

1. Elekto de kunvena gvidanto

Kiel kunvena gvidanto estis elektita Lars Kromann el Næstved.

2. Elekto de protokolantoj kaj voĉdon-kalkulantoj

Kiel protokolantojn oni elektis Ana Røssum kaj Bent Jensenius. Kiel voĉdon-kalkulantojn oni elektis Sten Svenonius kaj Karin Lindquist.

3. Jara raporto

La jara raporto estis aperigita en la hejmpaĝo de DEA kaj krome sendita al ĉiuj, konforme al la statuto. La prezidantino bonvenigis ĉiujn kaj detale prezentis la tutlandajn agadkampojn: **informado, instruado kaj utiligado** (vidu Esperanto en Danio 1-2005). Jen kelkaj elplukoj el ĝi:

- Ileana Schrøder raportis pri la **Zamenhof-vespero** la 15-an de decembro 2004 omaĝe al Ludoviko Zamenhof kaj memore al la Unesko-Rezolucio 1954 favore al Esperanto, en la Pola Ambasadego en Kopenhago. Partoprenis 65 esperantistoj de DEA, DEFA, KEK, Kopenhaga Esperanto kulturgrupo, kaj aliaj gastoj, ekzemple Robert Phillipson kaj Tove Skutnabb-Kangas.
- Ileana menciis la pozitivan evoluon ĉar la **membraro** iomete plialtiĝis kompare kun lasta jaro, precipe en Kopenhago. Dum la jaro aperis kelkaj **artikoloj en lokaj gazetoj**, interalie intervjuo kun Peter Weide en Frederiksværk Ugeblad, artikolo pri la kurso por daŭrigantoj de Ruds Vedby en Kalundborg Folkeblad, pri la vizito de bulgaraj esperantistoj en Nordjyske Stiftstidende kaj pri Esperanto en Arbejderbladet.
- Nia revuo Esperanto en Danio (**EeD**) aperis 4-foje dum la jaro 2004. Ĉar la kostoj pri sendado de la revuo plialtiĝis, oni petis kaj ricevis monan subtenon de 1.010 kronoj, kiu kovris parton de la dissend-kostoj.
- **Fortigita kunlaboro kun la junulara asocio.** Pasintjare DEJO akceptis la projekton ellaboritan de grupo da studentoj ĉe la Komerca Altlernejo de Kopenhago (Handelshøjskolen). DEA kune kun DEJO elkore akceptis ilian proponon kaj sugestis kiel enhavon de la projekto, du specojn da varbiloj: **afiŝoj kaj flugfolioj**. Komence de decembro 2004 prezentiĝis ekzemploj de afiŝoj kaj flugfolioj, kiuj aspektas tre altnivelaj kaj taŭgaj. DEJO jam elektis unu el la rezultoj kiel bazon por varbiloj en sia kampanjo en gimnazioj en februaro/marto 2005, kaj DEA volas ankaŭ realigi presadon de unu el la proponitaj flugfolioj.
- La projekto de kompilado de **dana-Esperanta vortaro** prokrastiĝis de lastjare al ĉi-jare, tamen Eliza Kehlet pretas plulabori pri ĝi.
- **La dana UN-unuiĝo** sendis respond-leteron al DEA, koncerne la Pekinan deklaron kaj la rezolucion de Nitobe-seminario senditajn al ili. Ili agnoskis la lingvajn problemojn en la internaciaj rilatoj kaj emfazis la gravecon persisti pri la 6 oficialaj lingvoj uzataj en UN, sed ili opinias ke la angla lingvo estas la plej taŭga kiel helplingvo, kaj ne povas apogi enkondukon de nova neŭtrala lingvo kiel Esperanto. Kelkajn tagojn poste Ileana partoprenis UN-jarkunvenon, parolis kun relative nov-elektita prezidantino kaj konstatis ke ŝi nek konas niajn konsultajn rilatojn nek la Unesko-rezolucion. Do la firma kunlaboro ankaŭ kun ili estas necesa.
- Ileana kaj Torben komentis la **hejmpaĝon**. Torben konstatis ke pli kaj pli da homoj vizitas ĝin. La plej ŝatataj temoj estas: la librolistoj de la libroservo, la kalendaro, utilaj ligiloj, elŝutoj de la retversioj de la membro-revuo EeD. Malgraŭ malfrua sendado de tekstoj kaj aliaj materialoj la hejmpaĝo ĝis nun estis bone ĝisdatigita kaj aktualigita.

Estis multaj demandoj koncerne dezirataj sed ĝis nun ne surdatigitaj aferoj sur ĝi, sed la klarigo de Torben estis: Ĝis nun Torben sola respondecis pri ĉio kaj faris grandan laboron. Laŭ Torben li dum la jaro 2004 ne ricevis seriozan proponon por kunlaboro. Fakte estas ke ankaŭ tia laboro postulas tempon, talenton kaj bonvolon por labori. Peter Weide informis pri la kunlaboro kun Torben koncerne la 16 regulojn.

Ileana atentigis pri la bezono de konscio pri laboro kaj devo en DEA. Ŝi substreki ke paŝon antaŭen oni akiras nur se oni vere deziras kunlabori kaj respekti la principojn de nia ĉefa organizo UEA.

Al la demando de Kim Henriksen, kial la raporto ne enhavas ion ajn pri kulturo, pensante pri Esperanto Desperado, Ileana respondis ke oni ne povas raporti pri iu agado pri kiu oni ne havas skriban materialon.

La jarraporto, malgraŭ multaj diversaj opinioj kaj komentoj, estis aplaŭde aprobita.

4. Jara kalkulaĵo

La kalkulaĵo estis klarigita de kasistino, Ina Schultz. Ŝi voĉe resumis kaj klarigis la kalkulaĵon kaj la kalkulaĵo estis aprobita. Elisa Kehlet demandis pri buĝeto por la jaro 2005, sed la statuto de DEA ne postulas tion.

5. Propono pri kotizo

Peter Weide proponis altigi la kotizon tiel, ke estonte individuaj membroj pagu 250 dkr, klubaj membroj 125 dkr. (La ĝisnunaj kotizoj estas respektive 180 kaj 90 dkr.)

La estraro proponis altigi la kotizon por individuaj membroj nur al 200 dkr. kaj tiun por klubaj membroj al 125 dkr.

Post kelkaj polemikaj diskutoj kaj kromaj proponoj oni decidis voĉdonadon. Plimulto de la ĉeestantoj voĉdonis por la propono de la estraro.

6a. Propono de la Estraro pri statutŝanĝoj

La proponojn de la estraro oni komune pritraktis, sugestis, voĉdonis kaj decidis:

- Ne akcepti la proponon pri §2.1 (transnational→international)
- Akcepti la proponon pri §2.2.8 (devigas ke DEA havu retpaĝon)
- Akcepti la proponon pri §6.3 (pri la estrara protokolo)
- Akcepti la proponon pri §9.4 (simpligo de la difino de voĉdonrajtaj membroj)
- Akcepti la proponon pri §10.1.1 (landskongres→årsmøde)
- Parte akcepti la proponon pri §10.1.2 (la kunvoko ne nepre okazos per la membretevuo, sed nepre enhavos provizoran tagordon)
- Akcepti modifon, kiun proponis Rasmus Høyrup, de la propono pri §§10.3, 10.4 kaj 10.5 (perreta publikigo de la tagordo unu semajnon antaŭ la ĝeneralkunveno, sed poŝta al tiuj kiuj deziras tion).

La teksto de la nova statuto estos aperigita en la sekvonta EeD kaj sur la hejmpaĝo.

6b. Propono de Kim Henriksen

Kim estis proponinta ke la hejmpaĝo prezentu kio estas Esperanto en Danio. La propono estis akceptita.

7. Elekto de prezidanto

La prezidantino Ileana Schrøder estis reelektita.

8. Elekto de 4 estraranoj

Ina Schultz kaj Jytte Sunekær estis reelektitaj. Novelektitaj estis Jens S. Larsen kaj Rasmus Høyrup Jensen.

9. Elekto de 2 anstataŭantoj

Estis elektitaj la ĝisnuna Ana Røssum, kaj Stanisław Mielczarek el Århus.

10. Elekto de 2 revizoroj kaj anstataŭanto

Aleksandro Kogan kaj Torben Svendsen estis novelektitaj kiel revizoroj. Laŭstatute oni ne bezonas havi anstataŭanton.

11. Ĝenerala jarkunveno 2006

La jarkunveno 2006 okazos la 25-an – 28-an de majo en Malmø, Svedio. Sten Svenonius atentigis ĉiujn pri graveco de tia partopreno kaj bonvenigis ĉiujn al Malmø.

12. Eventualaĵoj

Pri la **laborplano 2005/2006** la prezidantino raportis:

- Ĉijare en aŭtuno oni planas partopreni librofoiron en Forum, Kopenhago. La loko jam estas rezervita.
- Plifortigi informon pri esperanto, interalie pere de prelegoj en lernejoj.

- Plibonigi la retpaĝon.
- Instruado – diversnivelaĵoj kursoj, eldono de vortaro, daŭre flegi la rilatojn al RUC k.t.p.

Henning Olsen menciis ke Næstved Esperanto-Unuiĝo havas nombron da libroj, kiujn la klubo intencas donaci al **Esperanto-biblioteko en Vilno**. Li petas ĉiujn vojaĝontajn al la UK kunporti parton el la libroj, por ŝpari sendokostojn. Lars Kromann tiucele ankaŭ disdonis kelkan materialon.

Ana Røssum informis pri la postulo de la Imposto, ke la **Fonduso Esperanto-Domo** devas kolekti 100 donacojn jare dum 3 jaroj; ĉiu donaco devas sumiĝi je minimume 50 dkr. kaj maksimume 5.500 dkr. Depreno por la imposto eblas nur por sumoj pli altaj ol 500 dkr.

Fine Eliza Kehlet dankis pri la bona pasintjara laboro kaj la jarkunvena aranĝo. Ŝi deziris sukceson al la nova estraro, kaj ĉiuj aplaŭde subtenis ŝin.

Apelacio al ĉiuj, kiuj legas gazetojn!

Daŭre mi klopodas instigi ĉiujn danajn esperantistojn pri la neceso registri ĉiajn menciojn pri la internacia lingvo kaj pri la agado de la movado.

Montriĝis, ke ĉe kelkaj ekzistas dubo pri la amplekso de mia laboro kolekti kaj konservi artikolojn ktp: *Ne temas pri loka afero, ĉar mi estas komisiita de DEA kolekti por kaj el la tuta lando!* Sed plurfoje okazas, ke neniu sendas – aŭ eĉ, ke konato mia, neesperantisto, sendis artikolon, kiun mi alie ne estus ricevinta.

Por provi plibonigi la situacion, mi en la venontaj numeroj de *Esperanto en Danio* informos per kelkaj linioj pri la plej interesaj artikoloj kaj rezultoj de iniciatoj, pri kiuj mi ricevis eltondaĵon aŭ alian informon.

Do resume: *ĉiam sendu al mi ĉion interesan, do ankaŭ pri ĝeneralaj lingvaj problemoj* (ĉar ne gravas, ĉu mi ricevas duoblaĵon, prefere ol nenion!).

Ekzemploj de la lasta tempo:

- Intervjuo en Næstved Tidende kun 22-jara pola fraŭlino, kiu instruas Esperanton en lernejo de Stege. Bedaŭrinde ŝi ne reagis al nia letero.
- Mencioj en Næstved Tidende kaj lokaj semajnaj gazetoj pri tri prelegoj en Esperanto-Unuiĝo de Næstved (Køng-fabrikej, L.A.Ring-modeloj, aŭtoveturado tra Usono).
- Artikolo en Samvirke pri ‘Verdens største leksikon’ (“Plej granda enciklopedio de la mondo”, t.e. Wikipedia), kiu mencias la uzon de Esperanto inter aliaj lingvoj.
- Brila artikolo en Weekendavisen pri la Esperanto-kulturo sub la titolo ‘Hele verden lige på tungen’ (“La tuta mondo sur la lango”).

Grete Nielsen, Fyrrevænget 4, 4700 Næstved.

Esperantistoj honoras H.C. Andersen

Interese estis renkonti en la lasta numero de “La Ondo de Esperanto” la beletraĵon “Kion eblas elpensi” de Hans Christian Andersen en la bela traduko de Wolfgang Kirschstein. Oni menciis, ke tiu novelo mankas en la plena kolekto de Zamenhofaj tradukaĵoj. Efektive, Zamenhof tradukis eble duonon el la verkaĵoj de Andersen.

Por tiuj, kiuj volas plu omaĝi la 200-an datrevenon de la granda dana fabelisto, Lars Kromann kun helpo de aliaj starigis Andersenpaĝon ĉe <http://www.chifonoj.dk/>. La paĝo, li skribis al mi, ankoraŭ ne estas tute preta, sed ja preta en ĝi estas tabelo kun ligoj al (en subpaĝoj)

40 Esperantaj tradukaĵoj de diversaj Andersen-aĵoj, el kiuj la plimulto estas ne ankaŭ tradukitaj de Zamenhof. La tradukintoj gamas de la dana Esperanto-pioniro Frederik Skeel-Gjørting ĝis la nuntempe bone konata Poul Thorsen; kelkaj tradukoj estas lastatempe faritaj kolektive de la Kopenhagaj Esperantistoj kaj de la Esperanto-Unuiĝo en Næstved. Ĉiu tradukita fabelo enhavas unu aŭ du ilustraĵojn de Helen Claesson, kiu mem faris unu-du el la tradukaĵoj.

Don Harlow, Usono

Loke

Kopenhago

Konversacia Esperanto-Klubo (KEK) kaj DEFA

KEK kunvenas kune kun la fervojista klubo DEFA ĉiulunde jen 19.30-22.00 en Banedanmark entrepise, Vasbygade 10. Retadreso: defakek@hotmail.com.

Komuna manĝado la unuan lundon de ĉiu monato je 18.30. Buterpanoj mendeblas ĉe Ruth, tel 36 46 62 79 (kelkajn tagojn antaŭe), aŭ kunportu mem!

Kutimaj horoj: Kafo/teo-trinkado 19.30-20.00; programo 20.00-20.45 kaj 21.00-21.45.

Okazis:

La laborgrupo pri H C Andersen finiĝis per distra vespero, kiam vizitis nin la kreinto de la hejmpaĝo www.chifonoj.dk, Lars Kromann. Birthe Trærup klarigis pri kaj legis el Bildlibro sen bildoj. La kunlabora klubo de Næstved ankaŭ kontribuis.

Informado eksteren : Kim J. Henriksen montris multajn modelojn kaj formojn informi. Du svedoj kaj du danoj atente aŭskultis. La demandoj kaj suplementoj kompletigis la prelegon. Fine ni interkonsentis pri komuna informgrupo por la sunda regiono.

Esperanto Desperado plurloke ludis. Ĉiuj 5 laŭvice ludis solaĵon. La homoj tre ŝatas spekti ilin. Pluraj dancis. Pentekoste la grupo ludos dum la karnevalo en Fælledparken, kaj ni disdonos flugfoliojn

Bodil Kühlmann honoriĝis – ni kore gratulas.

En 1944 KEK ricevis novan membron: f-ino Bodil Petersen fakte ne emis forlasi la vigan Esperantoklubon en Fredericia. Dum Esperantokurso Gustav Kühlmann kaj Bodil enamiĝis. Tial ŝi tamen translokiĝis al Kopenhago. Ili geedziĝis kaj ilia vivo estis plena de Esperanto.

Ĉio estis farita kune kun Gustav, gvidanto dum kunvenoj, havis taskojn en UEA, tradukis inter alie artikolon pri la vivo de H.C.Andersen – laŭ peto de la ministerio pri eksteraj aferoj – por diskonigo en la tuta mondo. Ilia filino Lizeta lernis Esperanton kaj partoprenis la infankongreson en 1956. Lizeta ankaŭ helpis traduki la Koranon laŭ peto de Torben Kehlet. Ni povas esti dankemaj pro la 50-jara jubilea libro pri KEK, kiun Gustav iniciatis kunlabore kun Margrethe Noll, kiu verkis la unuan parton.

Jytte Sunekær

Kursoj

Kurso por komencantoj, kondukata de Regin Larsen, ĉiulunde 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45

Legogrupo: Arne Casper estras legogrupon (temo: La fabeloj de H.C.Andersen),

ĉiulunde 19.00-19.30 kaj 20.00-20.45

La kondiĉo por partopreni kurson aŭ legogrupon estas membreco de unu el tiuj kluboj: KEK, DEFA Kopenhago, DEJO. Parolu kun la du kasistoj, Karen Olsen (DEFA) kaj Egon Starup-Jensen (KEK).

Kunvenoj dum majo kaj junio

16/5 Pro pentekosto neniu kunveno.

23/5 Unuaj impresoj pri la 58a Fervojista Kongreso.

30/5 Jytte raportos pri la sveda jarkongreso en Haninge (sude de Stockholm) la 20-22an de majo.

6/6 Zita rakontos pri la esperantomovado en Litovio.

13/6 Olof kaj Daniel rakontos pri la projekto “La Loko”, kiu celas igi esperanton pli mojosa (t.e. ‘trendy’) – per televid-programoj, vestaĵoj, modernaj ekspozicioj, Esperanto-manĝoj ktp.

20/6 Ni somerstudos – por ne *tute* ferii de la studgrupoj ni traktos elektitajn ĉapitrojn de Faktoj kaj Fantazioj (M. Boulton).

27/6 Eugeniusz Rybarczyk: 20 minutoj pri ‘simboloj, signoj, himno’.

Kunvenoj dum julio

4/7 Egon rakontos: Mia esperantista vivo

11/7 Ni somerstudos – por ne *tute* ferii de la studgrupoj ni traktos elektitajn ĉapitrojn de Faktoj kaj Fantazioj (M. Boulton).

16/7 NB! Ĉi tiu okazas en sabato:

Somerekskurso al Køge

Ni renkontiĝos en Køge Station (ĉe la antaŭa fino de la kajoj) je horo 10.00.

Foriro de Kopenhago per S-trajno linio E 09.16, foriro de Næstved per trajno 09.22.

Ni vizitos Kjøge Miniby, kaj poste ni iros al Diget 2, kie loĝas Erik, por manĝi la kunportitan manĝaĵon – trinkaĵoj aĉeteblos.

18/7 Karen distros per taskoj pri la naturo

25/7 Ni somerstudos – por ne *tute* ferii de la studgrupoj ni traktos elektitajn ĉapitrojn de Faktoj kaj Fantazioj (M. Boulton).

Kunvenoj dum aŭgusto

1/8 Partoprenintoj donos impresojn post UK en Vilnius.

8/8 Jan rakontos pri INNOTRANS kaj KAEST – du fervoj-rilataj aranĝoj.

15/8 Blindaj esperantistoj rakontas.

22/8 Rakontu pri esperantolibro legita.

29/8 Ni somerstudos – por ne *tute* ferii de la studgrupoj ni traktos elektitajn ĉapitrojn de Faktoj kaj Fantazioj (M. Boulton).

Ŝanĝoj povos okazi.

Lene Niemann

Nova projekto de “La Loko”

Sabate la 7-an de majo, La Loko lanĉis la manĝejon **Ovo**. Ĉe Ovo oni servas simplajn kaj bonajn pladojn, kiel ekzemple mole boligitaĵojn ovojn. Ovo ankaŭ prezentos libron kun esperantaj libroj.

Olof kaj Daniel deĵoras tie – en ŝikaj uniformoj desegnitaj de **Hamayun Butt**, dum ses horoj tage, kvin tagojn semajne.

Ĉar estas la premiero de Ovo, oni faras eksperimentojn kaj klopodas aliajn aĵojn. Do oni ne nur estas interesataj vidi vin tie, sed ankaŭ volas aŭskulti viajn komentojn kaj sugestojn.

Bonvenon en “Ovo”, ĉe Appendiks, H.C. Ørstedesvej 66 st th, 1879 Frederiksberg.

De la 7-a de majo ĝis la 11-a de junio, Mardo – Sabato, 11 – 17.

Kontaktu nin rete ĉe www.laloko.org aŭ telefone per 4110 2026 (Olof) / 3027 9327 (Daniel).

*Ovo estas direktata de **Jacob Fabricius**. Ĝi estas subtenita de la Komitato pri vidaj artoj de la Dana Arta Konsilio, kaj produkita ĉe la Nacia Laborejo de Artoj kaj Slojdo.*

Libroj – periodaĵoj

*En la arkivo de DEFA troviĝas multaj fordoneblaj libroj kaj periodaĵoj (ekzemple *Monato, Espero*) – se vi bezonas legaĵojn por studgrupo, instruado aŭ por alia celo, turnu vin al ni, kaj ni sendos al vi liston.*

Niemann

Hovedvagsstræde 9E, 1.

DK – 3000 Helsingør

tel.: +45 49 26 13 19

rete: niemann@mail.dk



Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Fyrrevænget 4, 4700 Næstved, tel 5572 1240, rete atingebla pere de:
eho-esperanto@stofanet.dk.

Kunvenoj okazas principe ĉiun duan vendredon dum la monatoj septembro – aprilo en Grønnegades kaserne, Grønnegade 10, lokalo 111, ekde h 19.30.

Okazos:

Somer-ekskurso al Præstø en privataj aŭtomobiloj fine de junio aŭ komence de julio. Bonvolu informiĝi ĉe la sekretario.

Okazis:

18.02: Ordinara ĝeneralkunveno sen sensacioj.

25.02: Prelego pri la pentristo L.A.Ring kaj liaj modeloj. Ole Pilegaard Hansen, kiu esploralaboras pri la temo, rakontis.

11.03: Klubvespero kun diskutoj pri lastaj taskoj rilate hejmpaĝon pri fabeloj de H.C.Andersen.

18.03: Videofilmo pri aŭto-veturado tra Usono. (Ĉar la prognozita prelego ne povis okazi).

08.04: La kunvensezono finiĝis en ujutna maniero per frandaĵoj, voĉlego de fabelo kaj babilo pri estinto kaj estonto.

Århus

Prezidanto: Stanisław Mielczarek, Skovgårdsvænget 125, 8310 Tranbjerg J.

Tel./fakso: 86 29 23 06, retpoŝto: stanis@ofir.dk.

Kunvenejo: Senior-Centret, Østergade 30, 2., 8000 Århus C.

Kunvenoj: je la 19:30 h.

Okazos:

26.05: Stanisław Mielczarek rakontos pri sanatorioj en Pollando, kie li restadis kune kun sia edzino jam kelkfoje.

04.06: La ĉi-jara somera ekskurso celos la belan regionon de Ry/Silkeborg. Ĉiuj klubanoj, sed ankaŭ aliaj gastoj, estas bonvenaj. Bonvolu aliĝi telefonante al Stanisław Mielczarek, tel.: 86 29 23 06 antaŭ la 29-a de majo!

Okazis:

24.02: Tiun vesperon okazis Ĝenerala Kunveno. Niaj vicoj malgrandiĝas, sed tamen ni povos daŭrigi la kluban laboron, ĉar nur Jørgen Kristoffersen deziris retiriĝi. La nova estrarano estas Luja Miletić, kiun ni kore bonvenigas en la estraro.

31.03: Ni festis 200-jaran datrevenon de la naskiĝo de Hans Christian Andersen. Li vere estas mondkonata kaj liaj fabeloj estas tradukitaj en multajn lingvojn. Koran dankon al Paul Bigum, kiu gvidis la vesperon.

28.04: Vizitis nian klubon Lene kaj Jan Niemann kaj rakontis pri vojaĝo al Vjetnamo. Ili vizitis siajn danajn geamikojn, dungitaj labori tie, kaj kompreneble faris ekskursojn al diversaj vidindaj lokoj. Ni kore dankas al niaj gesamideanoj por tre interesa rakontado kaj belaj lumbildoj pri Vjetnamo.

Esperantosemajno en Martinus-Centro, Klint

Ankaŭ ĉi tiun jaron Martinus-Centro havos Esperanto-semajnon, 30.07 – 06.08, 2005.

Oni povas partopreni en tri diversaj studgrupoj kaj aŭskulti prelegojn antaŭtagmeze. La prelegoj estos simultane interpretataj en Esperanton. La Esperanto-semajno okazos samtempe kaj paralele kun la dana sveda angla kaj germana en internacia etoso. Posttagmeze oni novos partopreni la konversacian

Pri UK en Vilno 2005

Kleriga Tago

En Gotenburgo kaj Pekino, ni organizis en la kadro de la Universala Kongreso specialan kaj tre sukcesan klerigan tagon, en kiu okazis plej diversaj kunvenoj – pri la lingvo Esperanto, pri ĝia historio, pri la kongresa lando, pri novaj metodoj de informado, pri manieroj organizi kongresojn, ktp. Multaj kongresanoj partoprenis kaj sekve iris hejmen kun novaj ideoj kaj nova entuziasmo.

En Vilno ni denove prezentos nian Klerigan Tagon. Ni invitas vian partoprenon. Ĉu vi en via urbo aŭ lando ellaboris sukcesan elpaŝon en la disvastigo de Esperanto? Eble vi trovis manieron enpenetri la lokan gazetaron, aŭ utiligas lokajn foirojn por prezenti Esperanton, aŭ ellaboris novajn kaj trafajn informilojn, aŭ organizas novstilajn kongresojn aŭ kunvenojn? Ni deziras, ke tiuj bonaj ideoj cirkulu en la Esperanto-movado, kaj ke vi prezentu ilin en nia Kleriga Tago.

Ĉu vi aparte interesiĝas pri iu aspekto de Esperanto aŭ alia lingvo kaj ĝia funkciado? Se jes, proponu vin kiel parolanton en la Kleriga Tago. Ĉu vi havas ion por diri pri la historio de nia lingvo, eble en via regiono? Ĉu ion pri la Esperanto-literaturo, kiun eble vi aparte studis aŭ deziras prezenti? Aŭ pri tradukado? Aŭ pri utiligo de Esperanto en Interreto? Aŭ pri Esperanto en radio? Aŭ en scienco?

Bonaj ideoj kaj interesaj informoj abundas en nia movado, sed ili ofte ne atingas la tagolumon. Jen okazo por prezenti viajn ideojn kaj opiniojn. Ni ankaŭ aparte interesiĝas pri plenaj programeroj. Se du-tri personoj deziras kune prezenti ion novan, aŭ organizi podian diskuton pri iu temo, ili nepre proponu tion.

Tradicie, nur fakaj asocioj kaj instancoj de UEA aŭ aparte invititaj personoj havis rajton prezenti programojn en la kadro de la Universalaj Kongresoj. Nun, per la Kleriga Tago, la vojo estas malfermita ankaŭ al vi. Kaptu la okazon! Sendu vian proponon kiel eble plej baldaŭ al mi (tonkin@hartford.edu). Ne prokrastu!

Humphrey Tonkin [esper-inform]

Prelegoj pri Kosmologio

La Martinus-Instituto de Kopenhago, Danio, havos kvar prelegojn kaj unu budon dum la UK en Vilno dum la tagoj 24/7 – 30/7, kie oni informos pri la kosmologio de Martinus. En la budo oni disdonos senpagajn provnumerojn de KOSMOS, la spiriticsienca revuo de la Martinus-Instituto, kaj krome informojn pri la literaturo de Martinus (1890-1981) kaj pri la someraj Esperanto-semajnoj en Martinus-Centro, Klint, Klintvej 69, DK-4500 Nykøbing Sj. En la budo ankaŭ troviĝos la programo de kvar kosmologiaj prelegoj fare de Ole Therkelsen dum la 90-a UK, lunde, marde, ĵaŭde kaj vendrede. Ole prelegos pri la temoj: “Karmo, reenkarriĝo kaj evoluo”, “Feliĉaj kaj malfeliĉaj geedzecoj”, “Preĝo kiel scienco”, “La terglobo kiel viva estulo”.

Post la UK la kvar prelegoj aŭdeblas sur la adreso www.oletherkelsen.dk.

Helen Claesson

4-a Nitobe-Simpozio

Okazos la 4-an Nitobe-simpozion tuj post la 90-a Universala Kongreso en Vilno, de 30-a de julio (sabate posttagmeze) ĝis 1-a de aŭgusto 2005 (lunde posttagmeze). La aktoj de la 1-a kaj 3-a simpozioj aperis kaj haveblas ĉe UEA.

La serio de la simpozioj celas diskutigi gravajn lingvopolitikajn problemojn ĉirkaŭ la temoj de lingva egaleco kaj internacia lingva komunikado, samtempe indikante pri la alternativa lingvopolitika modelo Esperanto. La 4-a Nitobe-Simpozio traktos la kadran temon “Lingvopolitikaj aspektoj de la pliampleksigo de Eŭropa Unio”.

La organizantoj invitas renomajn neesperantistajn lingvistojn kaj alifakajn kompetentulojn pri lingvopolitikaj problemoj. La simpozioj estas direktitaj unuavice al neesperantistoj. Kunorganizanto de la simpozio estos la litova parlamenta komitato pri Eŭropaj aferoj.

Inter la aŭspiciantaj organizadoj estas la Universitato de Vilno, la Litova Akademio de Sciencoj, la Litova Parlamento kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo problemoj (CED).

Detlev Blanke [Bja-listo]

Tutpaĝe pri UK

La litovaj esperantistoj estis enorme aktivaj en la preparado de la 90-a UK. Jen du ekzemploj de la rezultoj:

En litova, tutlanda taggazeto "Lietuvos aidas" la 30-an de marto aperis tutpaĝa, litovlingva artikolo sur la 9-a paĝo pri la prepariĝoj de litovaj esperantistoj al la Universala Kongreso, kiu okazos somere en Litovio.

La artikolo temis pri Esperanto ĝenerale kaj multe okupiĝis pri la Universalaj Kongresoj kaj la agadoj de la litovaj esperantistoj.

La saman tagon litova, nacia radielsendo plurfoja resumis la artikolon en siaj trarigardoj pri taga gazetaro.

Pri IJK en Zakopane



Jam 440 personoj aliĝis al la 61-a Internacia Junulara Kongreso, okazonta en la belega, montara, senkula sud-pola urbo Zakopane de 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 2005!

La kongresa temo estas "Unueco en divers-eco". Rigardu tie unikan lokan arkitekturon kaj folkloron. Manĝu ŝafan kaj kaprajn fromaĝojn! Vi povos partopreni lingvan festivalon kaj ekkoni multajn aspektojn de egalrajteco!

Krom laŭtemaj aranĝoj okazos multegaj Esperanto-diskutoj, belega ekskurso al salminejo Wieliczka, prezentado de Esperanto-filmoj kaj tutnoktaj diskotekoj. Vi spertos nekredetblan etoson!! Vizitu la Nacian Parkon de Tatrymontaro kun lokaj bestoj: ŝafoj, marmotoj, ursoj kaj ĉamoj. Renkontu esperantistojn el la tuta mondo.

La alta protektanto de la kongreso konsentis esti la prezidento de Pollando Aleksander Kwaśniewski. Pliajn informojn vi trovos en la ttt-ejo <http://www.tejo.org/ijk>.

Irmina Szustak

Kontrakto pri libroj

La 15-an de marto 2005 en Vilnius, la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas kaj la direktoro de la renoma "Instituto pri eldonado de sciencaj kaj enciklopediaj libroj" Rimantas Kareckas subskribis kontrakton pri eldono de tri novaj libroj. Temas pri libro de Robert Philipson "Ĉu nur angla Europo?" (traduko el la angla), libro de René Centassi kaj Henri Masson "Homo, kiu defiis Babelon" (traduko el la franca) kaj originale en litova lingvo verkita libro de direktoro de Vilnusia teknika kolegio, estrarano de Litova Esperanto-Asocio, Algimantas Piliponis "Sociaj lingvaj aspektoj de merkato de nuntempa lingva komunikado".

La unuaj du libroj aperos en po 1000 ekzempleroj, la tria en 500 ekzempleroj. Tio estas jam la dua kontrakto inter Litova Esperanto-Asocio kaj tiu-ĉi instituto. Laŭ la unua kontrakto oni antaŭvidis eldoni sep librojn, el kiuj ses jam aperis. La sepa aperos ĝis la 90-a jubilea UK en Vilnius ĉi-jare.

Povilas Jegorovas

Invito el Latvio

Vojaĝante al UK en Vilnius, konatiĝu kun la najbara lando Latvio. La 15-a Internacia Esperanto Kongreso okazos en la ĉefurbo de Latvio Rigo kun abunda turisma programo, kun ebleco konatiĝi kun freŝa naturo, latva folkloro, moroj, tradicioj. Ekskursoj gvidos al barokstilaj palacoj kaj antikvaj kasteloj, al pilgrimloko en Aglona. La ekskursoj okazos Esperantlingve kaj vi povos pliprofondiĝi en historiaj faktoj pri Latvio kaj najbaraj landoj; vidu la retpaĝojn

www.geocities.com/mtimermane/IEK_15.html

kaj

www.geocities.com/mtimermane/Verda_Ondo.

La itineroj estas profesie preparitaj por la 15-a IEK laŭ la spertoj de antaŭaj e-aranĝoj kaj laŭ Bakalaŭra disertacio de AIS de Mara Timermane, respondeca pri turismo en Latvio kaj Bakalaŭra disertacio de AIS de Eva Abersone.

Mara Timermane

SOMERE en Wissen

La 3a SOMera Esperanto-REnkontiĝo okazos en Wissen (Sieg) oriente de Kolonjo (Germanio) de la 30a de julio ĝis la 14a de aŭgusto 2005.

Pliajn informojn oni povas peti ĉe la retadreso somere3@EsperantoLand.org. Aliĝilo troveblas ĉe <http://www.esperantoland.org/somere>.

Kunvenos ĉ. kvindeko da homoj el deko da landoj; ni pasigos somerajn tagojn, ĝuos la naturon, ludos, babilos, aŭskultos prelegojn kaj ekskursos. Se vi volas sperti internacian Esperanto-etoson, pasigi agrablajn feriojn, praktiki Esperanton aŭ eklerni la lingvon – jen renkontiĝo por vi.

Bela ĉirkaŭaĵo

Nia ĉi-jara domo troviĝas rande de monto kun bela rigardo super la valo de la rivero Sieg, en trankvila loko for de trafika bruo. La ĝardeno tre grandas – apud la domo estas razeno por ludi, ripozi kaj kun loko por bivaka kaj kradrosta fajroj. Pli for etendiĝas arbaro kun lageto kaj du malgrandaj riveretoj – la fino de la arbaro distancas plurcent metrojn de la domo. En la ĝardeno troviĝas ankaŭ loko por la jam tradicia tendaro de kelkaj partoprenantoj. Feliĉe ĉi-jare la vojo al naĝejo longas nur proksimume du kilometrojn. La regiono ĉirkaŭ la urbeto Wissen estas la bela mezalta montaro “Westerwald”, en kiu ni povos fari agrablajn ekskursojn.

Internacia partoprenantaro

Pasintjare ĉeestis 61 homoj el dektri landoj – la plimulto venis el eksterlando kaj alportis internacian etoson. Multaj partoprenantoj alveturis el la najbaraj Belgio, Nederlando kaj Francio kaj kelkaj el pli foraj landoj kiel Britio, Rusio aŭ Zimbabvo. Ni certas, ke ankaŭ ĉi-foje estos bele internacia renkontiĝo kun deko da infanoj; la loko estas per trajno nur unu horon for de Kolonjo.

Naturo kaj kulturo

La programa skemo estos simila al la pasintaj jaroj: Ni havos lingvokursojn kaj prelegojn, faros promenojn kaj ekskursojn, ni ludos kaj babilos. Estos Esperanto-kursoj por komencantoj kaj konversacia rondo. Kelkaj prelegoj kaj eble aliaj ofertoj de partoprenantoj iom klerigos nin. Ni planas promenojn en la kamparo kaj arbaro, vizitadon de la loka naĝejo kaj ekskursojn al najbaraj urbetoj kaj al Kolonjo. Estos diversaj ludoj por amuziĝi en la domo, en la ĝardeno kaj

en la arbaro. Kaj eble vi mem havas plian ideon kiel pliriĉigi la programon.

Tranoktado en ĉambro aŭ tendo

Ankaŭ la aranĝo pri tranoktado estos simila al la pasintaj SOMERE-kunvenoj: Vi povos laŭplaĉe elekti, ĉu loĝi en la domo aŭ en tendo, ruldomo aŭ loĝaŭto. Kompreneble via familio ankaŭ povos dividiĝi – eble viaj infanoj entuziasmas pri tendo kaj vi malpli ...

La domo havas ĉambrojn por unu ĝis kvar personoj; la plimulto havas lavabon. Duŝoj kaj bankuvoj troviĝas en la koridoro.

Memzorgado kaj rabatoj

Se vi ŝatos, vi povos mem zorgi pri viaj manĝaĵoj – kaj tiel redukti vian kotizon. Krome estas rabatoj por eksterlandanoj, programkontribuantoj kaj helpantoj (kaj por la donacantoj kaj kunlaborantoj de EsperantoLand). Se vi ŝatos prezenti programeron aŭ helpi en la kuirejo, bv. anonci tion sur la aliĝilo.

Por unuopuloj, paroj kaj familioj

La aĝogamo estos simile vasta kiel dum la pasintaj jaroj: de infanoj kaj dudekelkjaruloj ĝis sepdekkelkjaruloj. Pasintjare ĉeestis 13 infanoj ĝis 14 jaroj inter entute 61 partoprenantoj.

Tempodaŭro laŭ via elekto

Ankaŭ ĉi-foje ni planis dusemajnan renkontiĝon. Eble vi havos malpli da tempo kaj emo – restu kun ni tiel longe kiel vi deziras.

Lerni Esperanton kaj tuj apliki

Ni denove ofertos intencan kurson en la unuaj tagoj por ebligi la partoprenon al komencantoj kaj progresantoj. Ĉi-foje ĝi komenciĝos en dimanĉo, 31a de julio. Tiel eblis en unu sama aranĝo rapide eklerni kaj tuj poste praktiki la lingvon en internacia medio.

Neniu aliĝkotizo ĝis la fino de majo

Kaze de malaliĝo ĝis la fino de majo vi devos pagi neniom. Ni tamen petas vin ĝiri la aliĝkotizon jam nun por certigi vian lokon; kaze de eventuala malaliĝo ni reĝiros la monon.

Venu SOMERumi kun ni!

Ĉu vi interesiĝas? Ni kompreneble ĝojos, se ni baldaŭ ricevos vian aliĝon aŭ informon pri via intereso. (La unua aliĝperiodo finiĝos meze de majo.) Plenigu la aliĝilon menciitan supre aŭ sendu leteron al

EsperantoLand e.V.

Lu Wunsch-Rolshoven

Wiciefstr. 9, 2.HH, 3.St.

DE-10551 Berlin, Germanio.

KEF post kvin jaroj refoje en Finnlando

Kultura Esperanto Festivalo (KEF) okazas refoje post kvin jara paŭzo. La plej lasta okazis en Helsinko/Finnlando en 2000 kaj nun KEF revenas la duan fojon al Helsinko. Ĉi somera KEF okazos de la 16-a ĝis la 23-a de julio en la artisteca kvartalo de Helsinko, Kallio. La festivalon organizos kunlabore Finnlanda Esperantista Junularo (FEJO) kaj Esperanto Klubo de Helsinko (EKH).

Kio estas?

Kultura Esperanto- Festivalo inter Esperantoaranĝoj estas unika koncepto: la unusemajna festivalo koncentriĝas plene al altkvalita Esperanta kulturo, unuavice originalaĵoj. La unua KEF okazis en 1986 en Upsalo, Svedio, iniciatita de junaj, svedaj esperantistoj. La kerno de la festivalo estis ĝui kulturon, ne koncentriĝi al la lingvo mem aŭ ĝiaj propagandaj efikoj. De 1986 la festivalo okazis regule-ne-regule en iu nordia lando, ĝis nun en Svedio, Danio kaj Finnlando. Origine kelktaga aranĝo kreskis intertempe al tutsemajna festivalo.

KEF estas ne nur gravega forumo por prezenti kaj konsumi diversajn facetojn de kulturo kaj instigi homojn al kreemo, sed ankaŭ unika eblo al esperantaj artistoj renkonti sin kaj eĉ iniciati novajn projektojn. Pro iamaj KEFoj jam naskiĝis pluraj kulturmondaj fenomenoj en Esperantujo. La plej fama el ili estas sendube la bando *Persone*, kiu origine celis ludi nur por la unua KEF en Upsalo. Pro la plej lasta KEF 2000 en Helsinko estis lanĉitaj i.a plene esperantlingva diskoteko, realigita de Floreal Martorell el Vinilkosmo, kaj vasteta ekspozicio pri esperanta komiksarto. Pluraj novaj kaj malnovaj artistoj ankaŭ disfamiĝis al la granda espopubliko tra KEFoj. En 2000 okazis preskaŭ la unua surscenejiĝo de la nun tre fama *Dolchamar* kaj la unuaj akustikaj

paŝoj de *Dolchamar*, kiu la unuan fojon ĉisomere koncertos ankaŭ kun plene akustika repertuaro.

Kial tiel malofte?

“Organizi Kulturen Esperanto Festivalon postulas sufiĉe grandan budĝeton, se oni volas havi kulture altkvalitan programon. Se ni organizus internacian semajnon ekzemple naturteman en Finnujo, la budĝeto estus

supozeble dekono de tiu de kultura festivalo. Verŝajne ĝuste pro monaj kialoj KEF ne okazis dum la lastaj kvin jaroj”, rakontas Riitta Hämäläinen, prezidantino de la KEF-teamo. “En nia ĉi-jara KEF ni havos eĉ tri ekster-eŭropajn artistojn: artikoliston-tradukiston-eseiston Probal Dasgupta el Barato kaj la sudamerikajn muzikistojn Alejandro Cossavella kaj Flavio Fonseca. Ni refoje havas

bonegan literaturan programon sub temo “Korpo kaj kulturo” kaj ĉi-jare aparte vastan muzikan kaj teatran programon. Niaj specialaĵoj estos plene Esperanta oper-vespero, filmodublada konkurso, laborgrupoj pri beletra tradukado kaj artikolverkado, Esperantaj krimromanoj kaj erotika poezio. La plej amuza programero estos verŝajne esperanta karaokeo kun la efektiva bando mem – se nur iu kuraĝos karaoke kanti “Ĉu vi pretas” kun *Dolchamar*”, ridetas Riitta.

”Eble ne ĉiam estis tiel, sed laŭ mia opinio la nuntempa esperanta publiko ja scipovas aprezi bonan programon kaj artistojn. Almenaŭ ni tion esperas kaj tial indas organizi KEFon refoje.”

Pliaj informoj pri la KEF 2005:
www.esperanto.fi/kef2005.

Riitta Hämäläinen



Skotlando – ne nur por golfludantoj

22-a Internacia Festivalo

Festu kun ni en etosoplenda rondo, aliĝu al nia tradicia IF en Trier! La komforta klerigejo (ĉiuj ĉambroj kun duŝo kaj necesejo) situas ĉe la bordo de de Mozelo, kun belaj promenvojtoj kaj nur kvaronhora piedirado al la urba centro kaj historiaj vidindaĵoj. IF okazis jam trifoje en Trier, en 1988, 1997 kaj 2000.

Trier, proksima al Luksemburgio, estas la plej malnova urbo en Germanio kaj festis sian dumil-jariĝon en 1984. Nia amiko kaj longjara partopreninto (fakte seninterrompe en ĉiuj 21 IF-oj) Brian Moon el najbara Luksemburgio respondecas pri la urbaj promenoj kaj ankau ĉiĉeronos en nia tuttaga ekskurso al Luksemburgo kaj vilaĝo Schengen. En la “pligrandiĝinta Eŭropo” (nia kadra temo) Schengen fariĝis sinonimo por senlima vojaĝo (“ŝengena vizo”). Konatiĝu kun la ĉarmo de la mozela vinvilaĝo, promenu kun ni tra Luksemburgo kaj ĝia malnova urbo.

Bonvenon! Mi ĝojas pri la revido en Trier! Aliĝu interrete ĉe www.internacia-festivalo.de.

Hans-Dieter Platz

Belas Skotlando dum juni'...

Partoprenu vere historian okazon. La plej longdaŭra seninterrompa kongres-serio atingos la centan! De la 10-a ĝis la 13-a de junio 2005 okazos en la urbo Largs la Skota Kongreso de Esperanto.

John Francis, poeto, romanverkisto, kaj ano de la Kvaropo parolos pri siaj memoroj de la aliaj kvaropanoj, Auld, Dinwoodie kaj Rosetti. Kaj aliaj elstaruloj honoros la Skotan Skolon. Renato Corsetti, Prezidanto de UEA, partoprenos kaj faros la festparoladon.

La kongreso baziĝos en la apuddelta urbo Largs, sed dimanĉe ni kongresos sur la pitoreska insulo “Great Cumbrae”, kaj kunvenos en la belega “Katedralo de la Insuloj”. Ankoraŭ restas tempo por aliĝi... **ne maltrafu la okazon!** Detaloj de la programo haveblas ĉe www.skotlando.org kaj de tie vi povas elpresi aliĝilon.

... kaj ankaŭ dum septembro

La ĉiujara studrondo de la Esperanta Asocio de Skotlando okazos de la 3a ĝis la 4a de semptembro 2005 en Churches House (Domo de l' Eklezioj) en la pitoreska urbeto Dunblane, Skotlando. La temo ĉi-jare estas “**2005: La Jaro de Einstein**”.

Fizikistoj tutmonde celebras la centan datrevenon de la epokforma teorio de relativeco de Einstein. Ni amuze, lude, kaj leĝere respegulas niamaniere la celebroyjn. Sabatan posttagmezon ni ekskursos al “L'Ananaso” en Dunmore, kaj al Kastelo Airth kie ni lunĉos en ties hotelo. Informo kaj aliĝilo haveblas ĉe Hugh Reid, 24B Millar Street, Glassford, South Lanarkshire, Skotlando, ML10 6TD.

Hugh Reid

DEJO-ano en Brazilio

Juna dana esperantisto, Matthias Dalmore, jene raportas pri sia restado en Brazilo:

Antaŭ ses monatoj mi eksentis emon vojaĝi ien eksterlande, kaj ke prefere estu ia intenco de la vojaĝo. Tiam mi jam konis la nomon, Bona Espero, sed sciis pri ĝi vere nur ke ĝi estas lernejo ie en Brazilo, kiu iel rilatas al Esperanto. Nun mi estas multe pli scia pri tio, ĉar mi tuj kontaktis al Bona Espero por enketi pri la ebleco volontuli tie dum kelka tempo, eble monaton aŭ du. Ili tuj respondis ke jes ja estas ebleco por mi fari tion, kaj post malmulte da pripensado mi aĉetis bileton kaj ekis al la nekonateco de fora kontinento.



Ekskurso al la akvofalo dum mia naskiĝtago

Unue mi gastigis ĉe esperantisto en la ĉefurbo, Brazilio, kie mi restis semajnon. Poste mi ekis al la bieno, Bona Espero, kiu situas en sovaĝa naturo 20 kilometrojn de vilaĝo nomita Alto Paraiso (Alta Paradizo). Nur ĵuse la vojo de la vilaĝo estis asfaltata, sed ankoraŭ la lastajn 4 kilometrojn kondukas tera vojo. La tereno de Bona Espero estas granda: Mil hektaroj apartenas al la bieno. Plejparto de tio estas sovaĝa pejzaĝo da alta herbo kaj malaltaj arboj, kie vivas sovaĝoj bestoj el kiuj mi jam vidis serpentojn, lacertojn, emuojn kaj aliajn. Oni do ĉiam atentu kie oni paŝas, ĉar iuj el la ĉirkaŭ 20 specioj da serpentoj estas tre venenaj, kaj facile mortigas grandan beston kiel homon, se tiu ne atingas injekton de antidoto antaŭ du horoj. Sed, kiel diriĝis al mi veturigata je la unua fojo laŭ la

ruĝa tera vojo al la bieno, en ĉiu paradizo estas serpento. Kaj vere ŝajnas al mi paradiza loko, kun multaj diversaj fruktarboj, kiel banano, papajo, mango, gojabo, citrono, oranĝo kaj tiaj mirindaĵoj. Altaj eŭkaliptoj kreskas tie. Apude situas lago, kaj unu kilometron for la rivero plonĝas laŭ belega akvofalo.

Mi do venis tien tuj ravata de la belega ĉirkaŭaĵo, kaj la ĉarmaj infanoj venis saluti min en Esperanto. Poste mi eltrovis ke fakte ili plejparte estas "bonan-tagon-esperantistoj", kiuj nur scias kelkajn Esperantajn frazojn, sed kelkaj tute flue parolas. Efektive la celo de Bona Espero ne estas produkti esperantistojn. La celo

estas doni ŝancon al infanoj, venintaj el mizeraj kondiĉoj, edukiĝi por povi havi decan vivon. Antaŭ ĉio ili devas lerni kiel vivi kune kun aliaj homoj, en etoso de reciproka respekto, kie la plenkreskuloj ne batas la infanojn. Por multaj el la infanoj, tio estas tute nova sperto al kiu malfacilas adaptiĝi. Kelkaj ne sukcesas, sed ja multaj sukcesas, kaj precize por tiuj ekzistas Bona Espero. Kaj Esperanto subtenas la tutan aferon, tiel ke eblas ano de iu ajn nacieco veni kaj kontribui. Ĉiuj konstruaĵoj estas konstruitaj helpe de volontuloj. Germana-itala esperantista paro, Ursula kaj Giuseppe, kiuj ŝajnas estri la aferon, estas ankaŭ volontuloj, kiuj venis por helpi 2 jarojn, sed post 30 jaroj

ankoraŭ estas tie. Ili faras nekredeble grandan ĉiutagan laboron tie. 24 horojn tage ili servas kiel gepatroj por ĉiuj 25 infanoj kiuj loĝas tie. La lernejo havas kvar klasojn kaj unu instruistino, do ankaŭ ŝi faras grandegan laboron, al kiu kontribuas volontuloj kiel mi. Mi instruis la anglan kaj Esperanton, kaj ankaŭ iom da muziko kantante kun la infanoj. Krome miaj taskoj konsistis el konservado de la konstruaĵoj, laboro en la legomejo, rikolto de fruktoj. Semajnfine dum forta sunbrilado mi iris kun la infanoj naĝi en la lago, kaj atentis ke neniu estu kaptata de anakondo. Kelkfoje ankaŭ al la akvofalo, aŭ ekskurso al la monto. Kaj ofte venis subita tasko de plej neantaŭvidebla karaktero.

Kun la tempo mi pli kaj pli komprenas la portugalan lingvon, kaj eĉ sukcesas kelkfoje krei

kompreneblajn frazojn. Tiel mi ankaŭ havas ŝancon ekkoni kaj komuniki kun kelkaj lokaj homoj. Interalie mi amikiĝis kun muzikisto kiu loĝas tute sola en eta dometo, kiun li mem konstruis meze de la sovaĝejo. Tie mi vizitis lin, kaj ni kune muzikumis kaj babilis pri la vivo. Li montris al mi kiel li travivas per akvo de la rivero kaj fruktoj de la ĝangaleca arbaro proksima al lia domo. Unufoje semajne li promenas al la vilaĝo por muzikiste enspezi sufiĉe da mono por havi panon kaj kelkajn necesajojn kiuj ne troveblas en la naturo. Ŝajnas al mi ke li trovis la liberecon. Sed ni ne forgesu la danĝeron de loĝi en tia loko. Antaŭ kelkaj semajnoj mordis lin tre venena serpento, kaj li preskaŭ mortis de tio. Li ja vivas sen elektro kaj sen telefono, kaj devas marŝi longe se li bezonas helpon de ekstere. Nur post semajno li sukcesis kontakti najbaron, kaj en Bona Espero ni eksciis pri lia situacio. Mi biciklis al lia dometo, por enketi pri lia stato, kaj feliĉe, mirakle li ankoraŭ vivas, sed ankaŭ mem ne tute scias kiel li transvivis tion.

Mi vere ĝuis la tempon en Bona Espero, kaj de tie havas multan novan scion pri antaŭe

nekonata mondparto, pri la kondiĉoj de la homoj tie, pri kiom ĝueblas vivi kaj labori kune per Esperanto. Mi ja renkontis aliajn volontulojn, kun kiuj mi pasigis tre memorindan tempon. Dum mia tempo tie venis italo, japano, brazilanino, germanino, usonano, ĉinino, kaj multaj aliaj vizitantoj. Kelkaj restas kelkajn tagojn, kaj kelkaj restas semajnojn, monatojn aŭ jarojn. Mi restis preskaŭ kvin monatojn, dum kiuj mi 20 tagojn ekskursis al aliaj ŝtatoj, Espirito Santo kaj Rio de Janeiro. Dum tiu ekskurso, kiun mi pasigis kune kun japana volontulo, ni gastigis ĉe diversaj esperantistoj, kaj per la helpo de ili, ni spertis multajn mirindaĵojn, kiel belajn plaĝojn, vidindaĵojn kaj la karnevalon de Rio de Janeiro.

Post tiu spertado de la bruaj urbegoj, la reveno al la trankvilo de Bona Espero donis tre hejmecon senton.

Nun mi adiaŭis al Bona Espero, kaj estas denove en la ĉefurbo, ĉe alia esperantisto. Jam post tri semajnoj mi revenos al Danio, kaj ĝis tiam mi verŝajne vizitos kelkajn esperantistojn kaj klubojn, kie mi rakontos pri miaj spertoj en Brazilo, kaj pri Danio.

Internacia amikeca rentontiĝo en Bulonjo

Ĉirkaŭ 100 jarojn post la unua kongreso en Boulogne-sur-Mer mi alvenis trajne post 22-hora vojaĝo al la stacidomo de tiu urbo.

En la momento kiam mi metis la unuan piedon sur la kajon, mi aŭdis la laŭtparolilon: “Bonvenon al Boulogne-sur-Mer”, kaj tuj mi sentis min hejme.

Afablaj samideanoj ankaŭ bonvenigis nin en la atendejo. Bonega komenco de la renkontiĝo.

Facile ni trovis kun la helpo de francaj samideanoj nian apudan hotelon. Sabaton la 26an de marto je la 8.30 h. mi piediris kune kun 549 aliaj samideanoj el 21 landoj al la urba teatro. Ĉirkaŭ 90% de la urbo estis detruita dum la milito, sed feliĉe la ĉarma teatro restis netrafita.

La honora komitato multe parolis kaj en la franca kaj en la esperanta. Tiam venis kortuŝa momento kiam la aktoro Arno Lagrange ludis Zamenhof. Li ege vivante ekparolis la faman inaŭguran paroladon de L.L. Zamenhof en la sama loko kiel en 1905. Kun larmoj en la okuloj ni aŭdis la vortojn:

Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis

el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regionoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn, pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas.

Ni konsciu bone la tutan gravecon de l' hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ, inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Mar, kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj.

Kaj kiam li parolis pri Schleyer, pli frua pioniro de la ideo mondlingva, li forgesis akrajn atakojn de li. Li nur parolis pri la granda laborado de sia antaŭulo, kaj li petis la kongreson honori lian nomon.

Tio repensigis min, ke pli bona estas la kunlaboro por nia celo. Ofte mi en la movado renkontas personojn, kiuj ŝatas batali unu kontraŭ la aliaj. Sed mi petas ĉiujn pripensi la senton de nia majstro Ludoviko Zamenhof.

Poste ni kune defilis tra la urbo kun la urba muzikistaro ĝis la placo Zamenhof, kie denove ni aŭdis paroladojn kaj la orkestro ludis “la Esperon” kaj poste la Marseljezon.

Ni estis invititaj de la urbestro al la urbo-domo. Denove paroladoj kaj tro multe en la

franca. Sed ili regalis nin per trinkaĵoj kaj malavara bufedo.



Grupa foto de la partoprenantoj 1905

Claude Piron brile parolis pri Esperanto kaj ĝiaj perspektivoj unu jarcenton post la unua kongreso. Aŭdi lin signifis por mi, ke la vojaĝo sukcesis. Mi esperas, ke vi povos legi lian paroladon en la revuoj aŭ interrete.

Dum la kongreso estis aranĝitaj ekskursoj kaj mi partoprenis en kelkaj.

La plej mirinda estis la tuttaga ekskurso laŭ la paŝoj de Zamenhof al Britio. En tiu ekskurso ĉio kio povus malsukcesi malsukcesis. Niaj aŭtobusoj estis transportitaj trajne sub la kanalo unu horon malfrue. La ŝoforo ne trovis la ĝustan vojon en Folkstone, ĉar oni donis al ili erarajn mapojn.

La vetero estis la plej mirinda. Tiu tago estis la tago de nebulo. Tiel densa, ke ni absolute

nenion povis vidi. La plej mirinda nebulo dum la tuta jaro. Ni aŭdis la maron, sed ni vidis absolute nenion.

Ni vizitis la Dovran Kastelon. Nebula kaj malvarma afero. En Dovro ni iomete povis videti la blankajn klifojn, kiam ni veturis apude.

Dum la tago ni estis akceptitaj de unu afabla urbestro kaj ni manĝis bonegan manĝaĵon en restoracio. Tie ili diris al ni, ke ni estos bonvenaj alian fojon, kaj ili ricevis la respondon: jes ni certe revenos post 100 jaroj!

La britaj esperantistoj donis al ni bongustan vespermanĝon kaj poste ni povis spekti folkloran spektaklon. Sed post 15 interesaj minutoj, ni devis forlasi la lokon, ĉar pro la nebulego ni devis forveturi por atingi nian subtunelan trajnon.

Mi estas feliĉa, ke mi povis partopreni la kongreson en Boulogne-sur-Mer. Tio estis grava travivaĵo por mi. Dum la lastaj 100 jaroj nia lingvo disvastiĝis al multaj landoj. Mi opinias, ke Esperanto estas preta por la homaro, sed bedaŭrinde la homaro ankoraŭ ne estas preta por Esperanto. Ĝis tiam ni estas pioniroj kaj nia tasko estas vivteni la lingvon.

Ina Schultz

recenzo

Intimaj sentoj en Prago

“Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj” okazigis OSIEK-konferencon en Prago, julio 2003, kaj la prelegoj de tiu konferenco nun aperis libre. La prelegoj bone respegulas la tre diversajn intimajn temojn kaj sentojn, kiujn priskribas kaj pritraktas la Esperanto-beletro. La tre ĉarmaj ilustraĵoj de Pavel Rak povus kredigi ke temas sole pri erotik-rilataj temoj, sed verŝajne estas malfacile desegni temojn kiel ‘senpova atendo’, ‘timego’, ‘kolero’...

Difino kaj priskribo de la eco ‘intimaj temoj’ kaj ties rolo en la literaturo donas al la sep diversaj kontribuantoj eblecon prijuĝi literaturaĵojn, kiujn ili elektis ... ekzemple en la Biblio (laŭ la kontribuanto) estas nur konstatoj, sed neniam priskribo de sentoj (‘Adamo konis Evan, kaj ŝi gravediĝis.’).

Vlastimil Kočvara prelegis pri Karel Machá, vivinta 1810-1836, ‘fondinto’ de la nova ĉeĥa

poezio. Lia priskribo de la poeto estas tre bona, precipe por ne-ĉeĥoj. Sekve prezentiĝas la verkaro de la ĉeĥa Esperanto-poetino Eli Urbanová (eĉ kun eta kontribuo ŝia, ‘Ĉion kulpas viroj’) kaj de aliaj verkistoj.

Por mi estis tre lerniga afero legi la libron, kaj la lingvaĵo kaj stilo de la kontribuoj estas bele variaj laŭ speco, lingva nivelo kaj enhavo. Samtempe la kontribuantoj kune ‘rondiras la temon’, tiel ke mi scias iom pli ... mi eĉ ŝatus legi Eli Urbanová!

Laŭ mi estas bona ideo post-konferente eldoni prelegkolekton, ĉar alie oni devus serĉi multloke por akiri la samajn informojn. Estas bone por la ĉeestintoj, bone por tiuj, kiuj ĉi-foje ne povis ĉeesti – kaj eble instigo al ni aliaj ĉeesti venontfoje! Lene Niemann

Intimaj sentoj en la Esperanto-beletro. Redaktis Petr Chrdele, eldonis KAVA-PECH, Prago 2005, 103 paĝoj.

Reklamo pri Esperanto aperos tra Google

Tra la popularega ret-serĉilo Google baldaŭ disvastiĝos reklamo pri Esperanto. Fine de marto la teamo de la retejo lernu.net sukcesis gajni konkurson de Google pri senpaga reklamo. De tiam aktivuloj praparadis la reklam-ŝildojn kiuj aperos diversloke en la reto fine de majo aŭ komence de junio, rakontas Oleg Izjumenko, kiu iniciatis kaj gvidis la projekton:

Antaŭ du jaroj mi aktive ekproponis al la lernu-teamo de unu flanko reklami la retejon lernu! interrete, kaj de alia flanko montri reklamojn rilatajn al la enhavo de la paĝaro ĉe la ttt-ejo por parte kovri elspezojn por reklamado, servil-gastigado kaj tiel plu.

Post iom da diskutoj kaj pripensoj estis decidite fari someran reklamkampanjon en la jaro 2004. La fama usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF) financis la projekton. Ni elektis someron, ĉar tradicie dum tiu ĉi sezono aktiveco de ret-aktivado falas, kaj ni volis kompensi tion per aktiveco de novaj vizitantoj venintaj pro reklamo.

Ni ankaŭ decidis subteni tiujn lingvojn, kiuj aspektis ne tiom fortaj kompare kun la angla ĉe nia ttt-ejo: la franca, la hispana, la portugala, la germana, la pola, la sveda kaj ĉ. dek aliaj. Ni intence ne reklamis la ttt-ejon en la angla kaj en anglalingvaj landoj.

La mekanismo de la reta reklamado estas tre efika: vi prezentas vian servon kaj, se ĝi estas liverata al konsumantoj pere de la ttt-ejo, tiuj povas ekuzi ĝin preskaŭ tuj, post unu musklako. Ekzemple, se iu ĉeĥo vidis nian alvokon "Uĉte se esperanto!" (kun kelkaj linioj de ĉeĥlingvaj klarigoj pri nia kursaro kaj ĝiaj avantaĝoj), ŝi per unu klako estis enironta "lernu!" en sia denaska lingvo!

La kampanjo estis sufiĉe sukcesa, ni ricevis bonan nombron da vizitoj kaj novaj lernantoj kaj vere kompensis tiun "dormeman" someran periodon (do post kiam la kampanjo ĉesis en aŭtuno, ni spektis eĉ falon de statistiko!).

Aŭtune 2004 mi eksciis ke Google lanĉis sian programon de senpaga reklamado por

sociaj kaj klerigaj organizoj. Mi volis uzi tiun ĉi ŝancon, sed evidentiĝis ke la programo validas dume nur por usonaj organizoj. Ni decidis turni nin aŭ al ESF aŭ al ELNA. ESF akceptis la proponon kaj konsentis sendi la peton al Google (pri la peto multe helpis Chuck Smith). Fine de marto 2005 ni eksciis ke nia peto estis venkinta super ĉiuj aliaj konkurantaj kun nia.

Ĉi-foje, ĉar ni ne estis ligitaj per buĝetaj limoj, ni volis fari eĉ pli grandskalan kampanjon por Esperanto en la Reto: kun dudeko da lingvoj (inkluzive la anglan), kun belaj grafikaj reklam-afiŝoj ktp. La tutan monaton ni prepar-laboris: testis serĉofrazojn, verkis kaj tradukis reklam-tekstojn, desegnis kaj refaris reklam-afiŝojn...

Fine de aprilo ĉio estis preta kaj ni donis nian kampanjon al Google por superrigardo, kontrolo kaj eventuala korekto. Tiu ĉi procezo devos finiĝi post kelkaj semajnoj, kaj tiam nia kampanjo startos (fine de majo aŭ komence de junio). Do ne miru se vi hazarde renkontos ie en la reto alvokon lerni Esperanton, en via denaska lingvo!

Ankaŭ, post kiam iam fine de majo *lernu!* ekhavas novan, tute modernan kaj mojosan aspekton, ni komencos montri ĉe nia ttt-ejo reklamojn ligitajn kun lingvolernado kaj similajn. Do, vizitu ofte lernu.net!

Oleg Izjumenko [www.liberafolio.org]



TTT-ejo pri esperantaj poŝtmarkoj.

<<http://dauphin.guy.free.fr>>

Eblas

1°) Vidi liston kaj bildojn de la poŝtmarkoj.

2°) Aĉeti, vendi kaj interŝanĝi duoblaĵojn.

“Juna Amiko” aperas kun pli dika aspekto

Aperis la unua numero de Juna Amiko por la jaro, kaj la unua laŭ la nova 52-paĝa amplekso. Kvar plen-koloraj kovril-paĝoj entenas buntan sandviĉon da novaĵoj kaj legindaĵoj. Se vi mem ne abonas, kontaktu peranton por vidi specimenon kaj aboni. Meze de la revuo estas 6-paĝa sekcio por subteni kaj prezenti la projekton "Interkulturo". Mondmapo montras, kie troviĝas ĝiaj grupoj, tekstoj klarigas ĝian celon kaj oferton kaj donas ekzemplojn pri la enhavo de la ret-paĝaro de la projekto kaj invitas al novuloj aliĝi.



Vizitu la ret-paĝon de Juna amiko ĉe www.junaamiko.inf.hu por vidi liston de perantoj, la bazan vortliston de la revuo, kaj pli. Por vidi artikolojn el malnovaj numeroj iru al www.lernu.net, kie vi trovos rubrikon Juna Amiko en la biblioteko.

Ni jam havas 650 abonantojn por la jaro. Por ke la revuo vere prosperu, ni bezonas 800. Estu vi unu el ili! Juna amiko transformiĝis – nova grafiko, novaj rubrikaj, nova spirito. Provu nun!

Renato Corsetti

Ĉu viaj infanoj kaj familio parolas Esperanton?

- 1) Se via tuta familio parolas Esperanton, tiam taŭgas por vi feriado en REF (Renkonto de Esperantistaj Familioj), ĉi-jare en Pola Mazurio, antaŭ UK kaj survoje al Vilno. Informoj ĉe: familioj.komputilo.org/ref2005.html.
- 2) Se via infano parolas Esperanton kaj volas ferii kun aliaj infanoj, lasu ŝin aŭ lin en IIK (Internacia InfanKongreseto) dum vi restas en UK. – Informoj ĉe: www.uea.org/kongresoj/
Aliĝilo ĉe: www.uea.org/pdf/IIK2005.pdf.
- 3) Se vi interesiĝas pri la Esperanta familio, eblas aliĝi al Familia Rondo de UEA kaj ricevi ties bultenon “Familia Esperanto”.
- 4) Se vi ŝatus aliĝi al diskutlisto pri denaskuloj DENASK-L, petu tion de Jouko Lindstedt ĉe la adreso jslindst@cc.helsinki.fi.

Por kromaj informoj, skribu rekte al mi ĉe bert.schumann@free.fr.

Bert Schumann

“Ret-Info” iĝis senpaga

La retroŝta Esperanto-novaĵservo “Ret-Info” iĝis senpaga servo ekde januaro.

“Ret-info” ne distribuas ĉiujn mesaĝojn, sed filtradas, selektadas inter ili, simile al redakcioj de paperaj E-gazetoj.

Pliaj informoj pri la servo ĉe: <http://www.eventoj.hu>.

Aliĝo kaj malaliĝo povas okazi en tiu retpaĝo kaj ankaŭ ĉe la adreso: oficejo@eventoj.hu.

László Szilvási

Retejo en 24 lingvoj popularigas Esperanton

Pli ol 30.000 vizitojn monate ricevas la populara retejo Lernu.net, kie eblas studi Esperanton en 24 lingvoj. Pluraj dekoj da kunlaborantoj vivigas la projekton kiun financas la organizaĵo Esperantic Studies Foundation. La paĝaro ekzistas jam de pli ol du jaroj, sed ĝi baldaŭ modernigis, kaj por tio bezonas pliajn kompetentajn helpantojn.

Lernu.net, aŭ lernu!, kiel la teamanoj preferas nomi sian projekton, estas la plej ampleksa ekzistanta multlingva ret-paĝaro per kiu eblas lerni Esperanton. Pri la paĝaro okupiĝas pluraj dekoj da homoj, kaj la paĝaro nuntempe ekzistas en 24 lingvoj.

La dek plej popularaj lingvoj ĉe Lernu! estas la angla (3.727 registritaj uzantoj), Esperanto (3.525), la hispana (964), la portugala (673), la franca (665), la germana (625), la pola (547), la rusa (488), la litova (393) kaj la ĉina kun moderna ortografio (289). (Ekzistas ankaŭ ĉina variaĵo kun la tradicia ortografio, kiun oni uzas ekster Popola respubliko Ĉinio.)

La paĝaro de lernu! ricevas pli ol 30.000 vizitojn monate, kaj kutime registriĝas dudeko da novaj uzantoj ĉiutage. En la paĝaro eblas informiĝi pri Esperanto, eklerni la lingvon per pluraj diversaj kursoj, uzi superrigardan gramatikon kun ekzercoj, fari ekzamenojn, ludi lingvoludojn, legi kaj aŭskulti rakontojn, uzi diversajn vortarojn, interŝanĝi mesaĝojn kun aliaj interesigantoj pri Esperanto, partopreni virtualajn lecionojn, aŭskulti Esperant-muzikon kaj eĉ spekti filmetojn en Esperanto.

“La ideo pri la paĝaro naskiĝis jam antaŭ multaj jaroj, kaj la paĝaro funkcias jam de pli ol du jaroj”, rakontas Hokan Lundberg, unu el la iniciatintoj.

“Mark Fettes de Esperantic Studies Foundation kaj mi iom diskutis la ideon en 2000 dum UN-konferenco en Novjorko, sed nur komence de 2002 la unua konkreta projektskizo estis farita kaj ni prezentis ĝin al ESF kadre de CALICO aprile la saman jaron. Kelkajn monatojn poste ni ekrealigis la skizon kaj decembre 2002 la unua versio de lernu! estis lanĉita.”

“La paĝaron finance subtenas la organizaĵo Esperantic Studies Foundation, kiu financas ankaŭ plurajn aliajn signifajn projektojn en Esperantujo.”

“La projekto iom pagas al la kernaj teamanoj kaj aliaj helpantoj. Krome estas kostoj por la ttt-servilo, retregiono, KD-kaj informilproduktado, fizikaj teamkunsidoj kaj partopreno en konferencoj. Ĝis nun ESF financis ĉion (ankaŭ venis iomete da enspezo de KD-vendado), sed dum la



venontaj monatoj la plano estas pli kaj pli memstarigi lernu! finance”, rakontas Hokan Lundberg.

“La kernaj teamanoj de lernu! estas kvin personoj, kiuj regule kontribuas kaj retkunsidas. Al ili helpas kelkaj programistoj kaj trideko da kunlaborantoj kiuj tradukas la paĝaron kaj respondas al demandoj de lernantoj. La paĝaro baldaŭ ekhavos novan, pli modernan formon, kaj ankaŭ novaj kunlaborantoj estas tre bonvenaj”, atentigas Hokan Lundberg.

“Plej urĝe ni bezonus programistojn kun grandaj spertoj pri PHP kaj Mysql. Ankaŭ pli da Esperanto-pedagogoj kiuj povus helpi kreadon de novaj kaj plibonigon de nunaj kursoj estus granda avantaĝoj por la projekto.”

[www.liberafolio.org]

Forpasis Ludovikito



La 25-an de aprilo post longa malsano en la aĝo de 87 jaroj forpasis la elstara japana esperantisto ITÔ Kanzi, en Esperantujo pli konata sub la pseŭdonimo Ludovikito. En 1973 komencis aperi lia

“Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof”, kies volumoj tuj iĝis nepre legaĵo por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la historio de la Esperanto-movado.

En 1998 la verkaro de Zamenhof, kun la diversaj kromkajeroj eldonitaj de Ludovikito, havis jam 55 volumojn diversampleksajn, kaj en tiu jaro Japana Esperanto-Instituto donis al li “Specialan honorigon laŭ Akademia Merito”. Jam en 1990 Ludovikito iĝis honora membro de UEA.

ITÔ Kanzi pasigis la plej grandan parton de sia vivo en Kioto, kie li ankaŭ studis. Profesie li laboris ĉe la eldonejo Nagasue kiu specialiĝas je verkoj pri dent-kuracado. Esperanton li eklernis en 1959, unue leginte japanajn tradukojn el la verkoj de la konata blinda rusa esperantisto Vasilij Eroŝenko.

Post sia esperantistiĝo ITÔ Kanzi verkis japane biografian romanegon pri Zamenhof. La japanlingva verko ampleksas sume pli ol kvin mil paĝojn en ok volumoj, elkiuj la unua aperis en 1967 kaj la lasta en 1978. La plumnomo Ludovikito estas kunmetaĵo de la persona nomo de Ludoviko Zamenhof, kaj la familia nomo de ITÔ Kanzi, sed ĝia lasta parto estas ankaŭ scienca sufikso kun la signifo “suferanta je, mania je”.

Efektive preskaŭ manie Ludovikito ekde 1973 kolektis, editoris kaj eldonis plenan

verkaron de Zamenhof, entute 58 kajerojn ĝis 2004. La plej signifoplenajn originalajn tekstojn de Zamenhof li kolektis en la tri-voluma *iom reviziita plena verkaro de l.l. zamenhof* kun entute pli ol 2.800 paĝoj. La titolo efektive estas minuskla, ĉar Ludovikito en siaj propraj tekstoj neniam uzis majusklaajn literojn. La verkojn de ludoviko, kiel li kutimis nomi Zamenhof, li kompreneble aperigis precize en tiu formo en kiu ili estis verkitaj, farante grandajn fortostreĉojn por trovi la plej originalan tekston.

Komence Ludovikito nomis sian projekton de plena Zamenhofa verkaro “iam kompletigota”, sed kiam ĝi post preskaŭ tridekjara laboro fakte estis preta, li devis spite sian modestecon renomi ĝin “iel-tiel kompletigita”. Ludovikito ne nur kolektis la materialon kaj grandparte financis la eldonon. Li ankaŭ faris sciencan redaktan laboron, kaj krome mem kompostis la verkojn. Li havis enorman korespondadon kun aliaj spertuloj pri la vivo kaj verkoj de Zamenhof.

En 2004 Ludovikito kaj liaj kamaradoj eldonis la pli ol 250-paĝan verkon *pri nia pvz-ado*, en kiu li rakontas pri la historio de la enorma projekto, sed ankaŭ pri sia sinteno al Ludoviko Zamenhof:

mi intencis priskribi ludovikon ne kiel grandan homon, sed kiel ordinarulon, senigante al li tiujn legendojn, per kiuj la esperantistoj deziris lin ornami kaj beligi.

Al tiu “ordinarulo” Ludovikito dediĉis tridek jarojn el sia vivo.

[www.liberafolio.org]

Esperanto-malpermeso antaŭ 70 jaroj


La 17an de majo 1935 la tiama germana ministro pri scienco, edukado kaj popolklerigo, Bernhard Rust, malpermesis la instruadon de Esperanto en germanaj lernejoj. Kiel kaŭzon oni en la dekreto menciis, ke la uzado de Esperanto kondukus al “malfortigo de esencaj valoroj de la nacia karaktero”. Per tio la subpremado de Esperanto, kiu ekis jam komence de la nazia regado en 1933, estis oficiale konfirmita.

Granda parto de la Esperanto-kursoj en la lernejoj finiĝis jam antaŭ la dekreto; ankaŭ la kursoj en la radio ĉesis tuj post la nazia potencoakiro. La ĉesigo de la lerneja instruado, kiu ekde la dudekaj jaroj okazis en pli ol cent lernejoj en Germanio, kaj la malebligo de organizita laboro terure trafis la Esperanto-movadon kun sekvo dum pluraj jardekoj.

Forigo de la Esperanto-asocioj

La subpremado de la laboristaj asocioj okazis inter marto kaj decembro 1933 – la posedaĵon de Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA) en la oficejo konfiskis la polico, Socialista Esperanto-Asocio (SEA) decidis dissolviĝi, oni

konfiskis la havaĵon de la eldonejo EKRELO kaj la agado de SAT en Germanio estis malpermesita. Multaj el la aktivuloj de la laborista Esperanto-movado estis malliberigitaj, kelkaj mortis.



La plej grava konsultilo pri persekutoj kontraŭ la Esperanto-movado: “La danĝera lingvo” de Ulrich Lins.

La Germana Esperanto-Asocio (GEA) devis laŭ junia dekreto de Heinrich Himmler, gvidanto de la germana polico kaj de la nazia organizo “SS”, dissolviĝi ĝis la 15a de julio 1936 por eviti ŝtatan malfondon. Per tio finiĝis sub la nazioj la organizita laboro por Esperanto en Germanio.

Refondiĝo post la milito

Post la milito la Esperanto-grupoj en la zono okupita de la soveta armeo estis denove malpermesitaj la 12-an de januaro 1949; nur en 1965 fondiĝis en Germana Demokratia Respubliko (GDR) la Centra Laborrondo de Esperanto-amikoj (CLE). En okcidenta Germanio ekde

1946 reaperis Esperanto-grupoj, kiuj ricevis la permeson de la okcidentaj Aliancitoj.

La perdoj pro la nazia subpremado kaj la milito estis forte videblaj en la membro-nombroj, kiuj atingis malpli ol la duonon de la antaŭmilita tempo.

Lu Wunsch-Rolshoven

Anonco

Revu- kaj LibroServo de DEA
informas

FREŜAJ NOVAĴOJ
el via LibroServo

TINĈJO EN TIBETO

La aventuroj de Tinĉjo (Tintin) de Hergé

La eldono efektiviĝis en 2005 por honorigi la internacian amikecan Esperanto-renkontiĝon 'Boulogne 2005', kiu memorfestis la centjariĝon de la unua Universala Kongreso de Esperanto okazinta en la jaro 1905 en Boulogne-sur Mer.

La albumo 'Tinĉjo en Tibeto' emfazas la toleremon, la amikecon kaj solidarecon inter la diversnaciaj homoj. Esperanto ĝuste kontribuas al la disvolviĝo de tiuj valoroj tra la mondo.

Prezo kr. 120,00

SED HOMOJ KUN HOMOJ

Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005

Ziko Marcus Sikosek

Ekde 1905 esperantistoj ĉiujare 'pilgrimas' al la Universala Kongreso laŭ esprimo de Gaston Waringhien. Jen Universala Esperanto-Asocio prezentas ampleksan verkon pri la historio de la kongresoj, rakontantan pri kunvenoj, disputoj, ekskursoj kaj kulturaj programeroj. La naŭdek ĉapitroj por naŭdek kongresoj estas en flua, esea stilo kaj atentigas ne nur la organizadon, sed ankaŭ la partoprenantojn. Legu pri unika fenomeno en la internacia vivo: en la Universalaj Kongresoj, laŭ Zamenhof, ne kunvenas francoj kun angloj aŭ rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.

Prezo kr. 215,00

Bonvolu mendi aŭ rete aŭ telefone:

arne-casper@email.dk

3920 6348 & 2140 8487

Bildoj de ĉarmo



*Jen Rasmus kaj
Regin ĉarmas
novajn membrojn
de DEJO ...*

*... jen Tove
Skutnabb-Kangas
ĉarmas la
jarkunvenon ...*



*... kaj jen
Matthias ĉarmas
nin el Brazilo.*